



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 17 (72)

Novembro 1972

Novaja Redaktoro: Erik J. Felker
Literatura Redaktoro: Charles R. L. Power



Ĉu vi deziras doni esperantaĵon
al la Internacia Esperanto-Muzeo
(Vieno)?

S-ino Roan Orloff Stone informas, ke donacanto bezonas pagi nur la afrankon por sendi la aĵon al la Smithsonian Institute, kiu rajtas plusendi ĝin senpage al IEMW.

Metu la aĵon en kovrilon portantan la jenan adreson:

Österreichische Nationalbibliothek
1010 Wien
Josephsplatz 1 Österreich
(por Internacia Esperanto-Muzeo)

kaj metu tiun kovrilon en alian portantan la jenan adreson:

Smithsonian Institute
International Exchange Service
Washington, D. C. 20560

IEMW elkore dankas tiujn,
kiuj deziras kunlabori.

Semajno de Internacia Embaraso

Post malmultaj monatoj venos denove la Semajno de Internacia Amikeco, festo kiu ĉiujare pli-famiĝas inter Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj. Kaj denove ni vidos la nunan simbolon de SIA, la manpremon. Bela afero, ĉu ne?

NE! Tion ni diras pro tio, ke per uzo de la manpremo kiel simbolo de internacia amikeco, la tutmonda Esperanto-movado denove montras sian trookcidentecan orientiĝon. Ni memoru, ke la manpremo kiel simbolo de amikeco estas okcidenta koncepto, do en multaj landoj ne taŭga.

Sendu viajn komentojn kaj sugestojn, ni petas; petu al viaj eksterlandaj amikoj, ke ili faru same. Ni trovu, kiel esprimi vere tutmondan amikecon, kaj tiel fortigu tiun belan festosemajnon.

Samseksemuloj viraj kaj inaj

bonvolu kontakti s-ron Dermot J. F. Quirke de Anglujo, kiu klopodas starigi internacian, esperantlingvan, samseksemulan organizaĵon. Celoj: postuli homajn rajtojn por samseksemuloj kaj plifaciligi renkontojn kaj kunlaboron.

S-ro Quirke konstatas, ke samseksemuloj plej ofte bezonas anonimecon, kaj garantias, ke li zorge protektos tion.

Skribu viajn ideojn al:

S-ro Dermot J. F. Quirke
58 Hugon Road
London, SW 6 3EN
Anglujo



Nikolao Kopernik

S-ino Gretchen Doris informas, ke oni povas ricevi senpage libreton "Nikolao Kopernik, Torunano" kaj broŝuron "Kiel Nikolao Kopernik aviadisto fariĝis". Skribu al: Esperanto-Redakcio, Pola Radio, Poŝtkesto 46, Varsovio 1, Pollando.

Junularaj aferoj

Povas esti

ke junaj usonaj geesperantistoj sin sentas iom solecaj. Tiu problemo ekzistas ne nur ĉe ni--gejunuloj en multaj aliaj landoj ankaŭ strebas plifortigi siajn tre malgrandajn

movadojn kaj diskonigi Esperanton tie, kie ĝi estas ĝis nun preskaŭ tute nekonata.

Eble estus helpe kreskigi kontaktojn inter ni kaj la gejunuloj de tiuj landoj, por starigi reciprokan helpon.

Se vi samopinias, jen tri eblaĵoj por tuja kontakto:

Zaira Esperanto-Junularo
ce S-ro Paŭl D. Nzemba Paku
B. P. 198
Ken/Limite
Zairo--Zaire

Ĉilia Esperanto-Junularo
ce S-ro Iván Mättig Catalan
Ejército 180
Santiago
Ĉilio--Chile

Junulara Esperanto-Ligo Israela
p. k. 4070
31040 Haifa
Israelo--Israel

(reklamo)

Improve your conversational ability

Listen to these jewels of the conversational art, made during the 57-a Universala in Portland. These recordings are in stereo, on cassette or 5-inch reel.

SPECIAL INTRODUCTORY PRICE: \$4 each, postpaid.

Order by number:

- #72-1: Petro de Smedt, William Auld, B. Popović, Ralph Lewin
- #72-2: Emilija Lapenna, Victor Sadler, Ada Fighiera-Sikorska, Stojan Djoudjef, Duncan Charters

- #72-3: Harry Holmes, Nora Holmes, Mikulaš Nevan, Jaru Nevan

Indicate whether you want reel or cassette. If your reel-to-reel recorder plays only mono, please indicate.

Order directly from:

DEER'S ESPERANTO SUPPLY
12946 NE Hancock
Portland, Oregon 97230

Atentu, longharuloj!

Laŭ antaŭnelonga informo, Singapuro, Koreujo, kaj Filipina registaroj malafable traktas virojn kiuj havas longan hararon kaj volas eniri tiujn landojn. Fakte, oni ofte malpermesas eniron. Kaj se vi emas aspekti iom malneta, vi eble spertos problemojn en Indonezio, Tajlando, Laoso, kaj Cejlono.

**n o v a Ĵ o j
e l U s o n o**

Columbus Dispatch

de Ohio aperigis sur sia televidpaĝo du favorajn artikolojn pri Esperanto kaj pri la radia E-kurso de s-ino Robert L. Wills.

Radio-elsendejoj kiuj deziras lui la kurson sin turnu al WOSU, c/o Mr. Allen Hundley, 2400 Olentangy River Road, Columbus, Ohio 43201, aŭ al Mrs. Robert Wills, 94 West Riverglen, Worthington, Ohio 43085.

Informado

Longa, favora artikolo aperis en la ĵurnalo Press-Enterprise de Riverside, CA, je 1972.08.26, kun aldona letero al la redakcio de s-ro Carlton Caldwell, ELNA-ano.

Nellie Jane Campbell estas ankaŭ agema pri informado. Dum pasintaj monatoj, ŝi faris plurajn prelegojn kaj laboris por akceptigi la Wills-kurson al radio-elsendejo en Portland.

(reklamo)

EL POPOLA ĈINIO

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro \$2.00
2 jaroj \$3.00
3 jaroj \$4.00

ABONU: ĉe Esperanto Book Service
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro, ricevos belan esperantan bild-kalendaron.



Muzikistoj, muzikantoj, muzikuloj:

Muzika Ses-Ses Bulteno, internacia bulteno kaj forumo celanta la plibonigon de muzikskribado, samintervalajn klavarojn, muzikan legadon, muzikajn sistemojn, kaj rilatajn artojn, serĉas tradukiston angla-esperantan. Laŭ la redaktoro, "Kvankam la pago estas malalta kaj la eldonisto maldolĉa, la nematerialaj rekompencoj estas enormaj."

Interesuloj sin anoncu al:

Tom Reed, Editor
Musical Six-Six Newsletter
P. O. Box 207
Purdin, MO 64674 (Usono)

Inter multaj sindediĉaj

geinstruistoj de Esperanto estas s-ro Mark Starr, kies E-kurso aperas en la kurslisto de la Bryant Edukcentro por Plenkreskuloj.

La kodo "Numaŭdo"
de Ivor Darreg

La sistemo "Numaŭdo" ne estas lingvo; ĝi estas nur kodo. Nepre gravas tiu ĉi fakto, ĉar certe oni ne bezonas multecon da artefaritaj lingvoj! Tamen ekzistas unika situacio ĉe matematiko kaj la nova simbola logiko: tute male al ĉiuj naturaj kaj artefaritaj lingvoj, ili estas skribeblaj sed ne paroleblaj (kvankam oni ofte parolas pri ili). Ĝis nun, la matematiko estas muta lingvo, ĉar ĉiu provo elparoli ĝiajn kabalajn simbolojn devas aŭdiĝi kiel metafora mistraduko.

Neniam eblas paroli matematike, sed nur esperante, angle, france, germane, ktp, pri matematiko. Ekzemple, al la numeralo 2 mankas propra elparolo; anstataŭe, oni uzas vorton de iu ajn lingvo: du, zwei, two, dva, ktp. Eĉ esperante oni legas 12 kiel dek du, ne unudu; kaj

----- (reklamo) -----

ENTUZIASMIGE RAPIDA PROGRESO eblas per tute nova

COMPLETE SEVEN-DAY ESPERANTO COURSE FOR INTERNATIONAL

CORRESPONDENCE, by L. T. Tanaka (247p, 1971 - 8 3/8 x 10 7/8")

Kial oni deziras malŝpari sian tempon, kiam tiu ĉi kurso estas havebla por rapida progreso? (Legu recenzon en la maja, 1972, numero de "Esperanto".) Fidinda kurso kun tute nova, ekspresa instrumetodo celas tuj ebligi internacian korespondadon. Krome, ĝi estas multe malsama, ol aliaj, pri la jenaj: 1) Gramatikaj reguloj, klarigitaj simple kaj sisteme kaj numeritaj por tuja referenco; 2) La mnemonikaj (memorigaj) principoj de asociado kaj komparado, aplikitaj tra la libro; 3) "La Vortfinaĵa Tabelo pri Fundamentaj Vortoj", originale kontribuita de la aŭtoro; 4) Informmaterialoj pri korespondaj aferoj kaj la movado; 5) Tre utilaj vortlistoj, gramatikaj aldonaĵoj kaj multaj aliaj.

Dum iom da tempo la prezo estos nur po \$7.50 afrankite. Mendu ĉe:

GREEN STAR TRADING COMPANY (eldonejo)

P. O. Box 8916, Portland, Oregon 97208

20 kiel dudek, ne dunulo, pro tio, ke Esperanto estas lingvo por la ĉiutaga vivo, ne por robotoj, maŝinoj, aŭ elektronaj kalkuliloj.

Kiam algebristo skribas literon x , li tute ne povas paroli ĝin mem, sed nur ĝian francan nomon, aŭ anglan nomon, aŭ alilingvan.... Ĉi tiuj elparolataj nomoj estas fantazie diversaj: iks, eks, ekis, ŝiŝ, ktp; v transformigas al ve, vi, vū, faŭ, ube, vo, ktp.... Kia fuŝaĵo!

La aliaj signoj kaj simboloj, ekz. $\sqrt{\sim} [] + \supset \cap \cup \vee \cdot \prime \prime = \leq <$, ne nur havas plurajn nomojn, sed ili ankaŭ havas po pluraj signifoj! Ĉe la simbola logiko (Boole'a, logistiko, matematika aŭ formala logiko), diversaj aŭtoroj uzas malsamajn signojn por la sama ideo. Ekz., \sim , $_$, \prime , ĉiuj signifas "ne".

Ni jam diris, ke la internacia skriba sistemo de matematikaj kaj logikaj simboloj, numeraloj, kaj literoj latinaj kaj grekaj, estas muta, neelparolebla: oni ĉiam devas traduki ĝin en iun alian lingvon por povi ĝin elparoli, ĝin aŭdi. Do oni neniam aŭdas la simbolojn, sed nur iliajn parollingvajn tradukojn! Ofte, mistradukojn; preskaŭ ĉiam, metaforajn tradukojn.

Ni ne bezonas novan internacian matematikan lingvon; ni jam ĝin havas de post pluraj jarcentoj. Ni bezonas nur aŭdeblan kodon, por sonigi la simbolojn de ĉi tiu muta matematika lingvo. Unuvorte, ni bezonas numeralauĝigilon.

Jen la klarigo de la nomo de ĉi tiu nova kodo: "numeralaŭĝigilo" estas bona Esperanto, sed ĝi estas ...tro longa. Ni tial bezonas mallongigon. Jen: Numaŭdo.

Bone. Ni faru kodon, aŭdeblan, paroleblan kodon. Sed kiel? Per sonigo de la literoj? Kiel oni elparolus $w + 2xz - \sqrt{5}$? Ĉia elparolo estus metafora mistraduko. Traduko per vortoj trolongigus la simbolojn kaj malŝparus tempon. Kion fari?

Kiom da matematikaj simboloj ekzistas? Almenaŭ pluraj centoj. Nia alfabeto ne havas pli ol tridek literojn, sed vortaroj povas enhavi pli ol cent milojn da eblaj vortoj--eĉ milionon. Ne sufiĉe da literoj; troeco da vortoj. Ni provu silabojn.... Jen la solvo.

En la jaro 1972, Numaŭdo havas preskaŭ 440 silabojn. Oni povas enkonduki novajn silabojn ĝis pli ol 2500, laŭ numauĝaj reguloj. Tio sendube sufiĉos dum la estontaj jarcentoj. Fakte, la plejparto de la uzantoj de Numaŭdo bezonas lerni nur kvardek-sesdek silabojn, ne la tutan kodon. Ĉu sistemo de silaboj funkcios? Ĉu Numaŭdo estos praktikaĵo?

La solfeĝo, kiu jam sukcesis dum 930 jaroj de post Guido d'Arezzo, donas al ni jesan respondon. Ĝiaj silaboj re, mi, fa, sol, la, jam havas grandan aĝon! Ili esprimas la fizikan kaj matematikan kaj logikan bazon de la muziko. Do la solfeĝo jam pruvis, ke sistemo kun matematikologiaj silaboj funkcias.

Oni instruus al studentoj per sonbendo aŭ similaj metodoj, ĉar Numaŭdo estas aŭdebla kodo. Fonetika skribo de la numauĝaj silaboj uzas 22 literojn, tiel ke ĝi fariĝas maŝinskribebla kodo, kiu havas apartan nomon: Numliteraĵo. Ĉiuj tajpistoj tiel havas matematikajn maŝinojn sen elspezo por ŝanĝoj aŭ aldonoj al la klavaro.

La helpo kiun Numaŭdo donas al blinduloj estas jam preskaŭ senlima. Se tio estus la sola utilo por Numaŭdo, la kodo restus valorega sen io alia.

(NdlR: Se vi deziras ekscii pli pri Numaŭdo, kontaktu ĝian kreinton, s-ron Ivor Darreg, 3426 Winslow Drive, Los Angeles, CA 90026, Usono.)

@#\$/&*?;½!

La satira revuo National Lampoon aperigis en sia novembra numero artikolon "How to Talk Dirty in Esperanto". Kvankam la sugestoj estas plejparte fuŝaj kaj la gramatiko tute terura, malmultaj legantoj scios tion, kaj la atento estas bonvena. Ni kredas, ke estus bona ideo skribi al la revuo kaj menciigi, ke interesuloj povas kontakti Esperanto Information Center, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010 kaj ekscii kiel lerni la lingvon. La adreso de National Lampoon estas 635 Madison Avenue, New York, New York 10022.

Solvoj al la enigmoj pasintnumeraj

<u>Teren:</u>	<u>Ebene:</u>
1. dume	1. devu
2. vi	4. in
3. unuo	5. mi
6. id	7. edzo

Sekvanta numero: 7

Korespondamikoj

E-klaso de junaj hungarinoj deziras korespondi kun junaj geusonanoj.

Ĉe F-ino Jolan Berhidi
Budapest, XVII
Rakosliget VIII, u. 6
Hungario

Emilia Pienowska
Gdansk-Oliwa
ul. Pdienki 64 DS 5
Pollando

Lernantino kiu studas nun la anglan.

Stefano Laczko
Dembreceno
str. E. Landler 37.1.4
Hungarujo
16-jara. Interesiĝas pri astronomio, geografio, arto. Kolektas poŝtmarkojn.

F-ino Anne Jadal
Regati Pst. 16A
200019 Tallin
Estonio, Sovetunio
16-jara.

F-ino Elena Lazzini
Viale Roma 146
54037 Marina di Massa
Italujo
22-jara studentino.

F-ino Annegret Kass
D-3071 Balge 29
Koler Nienburg/Weser
Germanujo (Fed. Resp.)
16-jara studentino. Ŝat-okupoj estas legado, naĝado, kaj dancado.

F-ino Hisako Noomi
Daimyo 1-13-3
Fukuoka-shi
Japanujo
16-jara studentino pri komerco. Komencantino pri Esp-o. Interesiĝas pri sporto.

S-ro Vladimir Nad
Pere Popadića 14
2100 Novi Sad
Jugoslavio
25-jara oficisto fraŭla. Interesiĝas pri poŝtmarkoj kaj bildkartoj. Volas korespondi Esperantlingve aŭ germane.

Subita ideo

Kial ne starigi kunlaboron inter la loka aŭ ŝtata E-klubo kaj la samranga filio de United Nations Association por festeni UNO-Tagon (24-a de oktobro) aŭ la Tagon de Homaj Rajtoj (10-a de decembro)?

Ĉu al TORONTO en 1973? (vidu p. 9)

La pasinteco meze de l' futuro --Jeffry A. Judd

La junulino rekonsciiĝis ankoraŭ ligata al la ligna seĝo, kaj ŝvito gutis de sur ŝia vizaĝo. Ŝi rigardis ĉirkaŭ si. Amaso sin premis kontraŭ la murojn de la eta ligna konstruaĵo. Denove, la senĉesa voĉo venis al ŝi: "Goody Perry, ni ĉiuj scias, ke vi ĉeestis la kunvenon de la sorĉa konsilantaro. Sed vi diris, ke vi ne faris sorĉon. Iuj personoj defendas vin, aliaj personoj ne. Kelkaj personoj diras, ke vi metis sorĉon sur Providence Patton. Goody Perry, ĉu vi metis sorĉon sur Providence Patton?"

"Ne--mi intencas, jes! Ho! Mi ne scias, kion mi intencas! Vi konfuzas min!"

"Goody Perry, mi petas vin respondi: ĉu vi povas meti sorĉon ĉi tie, en tiu ĉi juĝejo, sur min?" La pridemandanto de la junulino paŭzis kaj atendis. "Juĝisto Wilson, rigardu, ŝi ne povas! Ŝi ne estas sorĉistino! Ĉu tiu ĉi junulino devus esti kondamnita? Mi diras, ke jes!"

La juĝisto, kiu ankaŭ estis la ĵurio, faris sian decidon. "Goody Perry, tiu ĉi kortumo trovas vin kulpa de spionado por mortemuloj kaj kondamnas vin bruli ĉe la paliso, hodiaŭ je noktomezo."

Kurteno falas al la planko de la scenejo dum entuziasma spektantaro aplaŭdas.

Tra malluma, kvieta strato, du viroj marŝis. "La teatraĵo estis agrabla. Mi neniam spektis teatraĵon antaŭe."

"Jes, estis amuze. Mi ĝuas la teatraĵon pli ol la filmon. Kiel vi iros hejmen?"

"Mi alportis mian aeroĉaron. Jen ĝi estas. Nu, ni vidos nin marde. Hasta luego!"

"Goodbye! Pilotu zorge!"

Korektendaĵoj

Ĉe la poemo "Ŝtono, ne ŝtoneto" en nia septembra numero, la aŭtoro nomo devas esti "Gilfillan", ne "Gifillan", kaj ĉe la lasta linio de tiu poemo, "gis" fariĝu "ĝis".

Solvo al "La Tri Remboatistoj" (vidu p. 10) --Ken Meyer

Se la unua homo estus koĵotano, li devus diri, vere, "Mi estas koĵotano." Aliflanke, se li estus serpentano, li devus mensogi. Do, li dirus, mensoge, "Mi estas koĵotano." Tiel ni certas ke, ĉu li estas koĵotano aŭ serpentano, li dirus, "Mi estas koĵotano." La dua homo faris tri asertojn. Unue: "Li diris, ke li estas koĵotano." Due: "Li estas koĵotano." Tria: "Mi estas koĵotano." Se ni povas pravi unu al la tri asertoj vera aŭ malvera, ni povas scii, kia homo li estas. Kaj laŭ nia unua alineo, la unua aserto, "Li diris, ke li estas koĵotano," certe estas vera. Do, la aliaj asertoj ankaŭ estas veraj. La unuaj du homoj estas koĵotanoj, la tria serpentano.

Recenzoj

--karl pov

Bahá'í: La Mondkredo por la Nuntempa Homaro, de Arthur L. Dahl. Elangligis Roan Orloff Stone. 1972. 22p. Prezo ne indikita; verŝajne ricevebla senpage ĉe la eldonejo, Bahá'í Publishing Trust, Wilmette, Illinois 60091.

La aŭtoro priskribas la kredojn, historion, kaj administran sistemon de religio kvazaŭ indiĝena al Esperantujo, multrilate simila al la zamenhofa homaranismo. Ĝin tre frue diskonigis al esperantistoj Lidja Zamenhof, filino de la Majstro. Kiel tuthomara religio Bahaismo antaŭvidas i. a. internacian lingvon, kvankam ankoraŭ ne estas decidite, ke tio estos Esperanto.

La recenzisto restas scivolema pri la registara sistemo stariguta laŭ bahaaj principoj. "Oni forigos la ekstremojn de riĉeco kaj malriĉeco, kaj oni volonte helpos al la malpli bonŝancaj kunhomoj." Sed se ne volonte? Kaj en ĉi tiu ribelema epoko, la devigo pri permeso de ĉiuj vivantaj gepatroj antaŭ la geedziĝo de filo au filino meritas eksplikon.

Lingvaj ĉikanindaĵoj: Plurfoje nominativa adjektivo troviĝas ĉe akuzativa substantivo (6: -2, 8: 15, 13: -7, 14: 5, 16: -16); ne temas pri predikativo de objekto. Ĉe 20: -17, mankas relativa pronomo. Ĉe 12: -4, adverba participo rilatas al objekto de frazo--eraro, kiu okazas eĉ ĉe niaj plej brilaj verkistoj.

Entute la verketo estas bonvena kaj, eĉ por ĉi tiu ateista recenzisto, interesplena. Se oni serĉas religion, Bahaismo ja ŝajnas inter la plej simpatiaj.

Kun Onklo Ho. Eldonis Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1972. 400p. Broŝ. \$2.10 ĉe Esperanto Book Service, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

Estas homoj kiuj, kvazaŭ magnetoj, altiras al si legendojn. Reĝo Arturo de Britujo, Karlo la Granda de Francujo, Prezidentoj Vaŝingtono kaj Lincoln de Usono--kaj nun tuta aro da vjetnamoj: Vuong, Tran, Ba, Thu, Nguyen Ai Quoc, Thau Chin, kaj finfine Ho Chi Minh. Ili--tio estas, li, ĉar unu homo portis tiujn nomojn-- estas la subjekto de tiu ĉi kompilaĵo de dudek unu artikoloj, el kiuj la du unuaj jam eldoniĝis en apartaj kajeroj.

Plejparte temas pri personaj memoroj diversperiodaj de kamaradoj. Kompreneble, kelkaj trajtoj ripetigis en pluraj artikoloj. Ni vidas "nian onklon" portanta skribmaŝinon kaj verkanta revolucian propagandon sub la plej malfacilaj kondiĉoj. Li ĉiam penas verki kiel eble plej simple kaj klare. Li restas stoika fronte al ĉiaj--sufiĉe oftaj--malsanoj, kaj provas ĉiel ajn helpi al siaj kamaradoj, eĉ farigante "geedziĝa konsilisto"!

Oni ŝatus vidi eseojn ankaŭ de nevjetnamoj, ekzemple francoj kiuj konis "s-ron Nguyen" en Parizo au la usona Leŭtenanto Shaw, kiun savis la Vjet Minh-Ligo dum la Dua Mondmilito, kiam li devis paraŝuti en Vjetnamion.

Ne mankas lingvaj eraroj kaj kritikindaĵoj, sed ili ne ĝenas la legadon, kiu estas multe pli interesa ol kutime ĉe politikaj eldonaĵoj. Certe ĉi tie oni havas la fontajn dokumentojn, kiujn estontaj biografoj de "Onklo Ho" devos utiligi.

Al Toronto

--SAT-rondo de Toronto

La SAT-rondo de Toronto, Kanado, invitas vin partopreni la 46-an Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda, de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1973.

Ĝi estos la unua ekstereŭropa SAT-Kongreso, kaj kvankam nia rondo estas modesta kompare al tiuj de Roterdamo aŭ Parizo kaj spite la fakton ke la plej granda nombro de nia asocio loĝas en Eŭropo, ni kredas, ke la kongreso estos sukcesa. Ni estas pretaj streĉe labori por tiu celo, sed kompreneble la sukceso dependos de ĉiuj kongrespartoprenontoj. Venu multnombre, venu entuziasme; estu konvinkitaj, ke vi ne bedaŭros la vojaĝon.

Kvankam Toronto estas grandega kaj moderna urbo kun cirkaŭ du milionoj da enloĝantoj, grava ne nur ekonomie, sed ankaŭ kiel unu el la grandaj kulturcentroj nordamerikaj, ĝi ne estas sufiĉe konata alikontinente. Ankoraŭ ekzistas la misideo ke la tuta Kanado, inkluzive Toronton, troviĝas en la nordpolusa regiono, ke ĝi estas la lando de la vastega nordo kun neĝkovritaj stepoj, felvestitaj eskimoj, kaj blankaj ursoj. Agrable seniluziigu kaj eksci, ke Toronto troviĝas sur la latitudo 43°N same kiel Bilbao en Hispanio, Tuluzo kaj Marsejlo en Francio, Sieno kaj Florenco en Italio. Dum julio kaj aŭgusto la vetero estos varmega, kaj vi povos lasi hejme vintraĵajn paltojn, kaj ĝui la spektaklon de jupet-vestitaj kanadaninoj se viaj satanecaj malvirtaj okuloj havas tian inklinton.

La historio de Toronto estas relative ĵusa; ĝia nomo signifas en la hurona lingvo "renkontiĝloko"; efektive, dum la 15-a kaj 16-a jarcentoj en tiu loko renkontiĝis diversaj indianaj triboj por interŝanĝi varojn. En la jaro 1750 francaj koloniistoj tie konstruis fuorton--Fort Rouillé--laŭ la nomo de la tiama franca kolonia ministro; la fuorto estis poste detruita de la angloj. Laŭ la traktato de Parizo en 1763, la francoj rezignis favore al la angloj ĉiujn rajtojn en la teritorio oriente de la rivero Misisipo kaj inter la Hudsona Markolo kaj la Golfo de Meksikio. Sed, almenaŭ teorie, la tereno sur kiu hodiaŭ troviĝas Toronto apartenis ankoraŭ al la indianoj. En la jaro 1788 Lordo Dorchester, la tiama angla guberniestro de Kanado, kunvenis kun la estroj de la misisaŭgaj indianoj kaj aĉetis la teritorion por 149 bareloj da varoj, tukoj, hakiloj, kaj diversaj bagatelaĵoj.

Ĝis antaŭ nemultaj jaroj Toronto havis la aspekton de provinca vilaĝego, sed drastaj ŝanĝoj rapide okazis, kaj nun ĝi havas multon por proponi al siaj loĝantoj kaj vizitantoj. Ni menciuj la Universitaton de Toronto, unu el la plej gravaj en Nordameriko; novan urbodomon kun tre originala strukturo; artan galerion; antropologian muzeon; modernan sciencan centron kie la vizitantoj rajtas tuŝi kaj manipuli ĉiujn objektojn; kaj oni pasintjare finkonstruis ĉe la lago Ontario tri artefaritajn insulojn kun parkoj, restoracioj, kaj amuzejoj.

Sed ne ĉio vidinda troviĝas en Toronto mem. Je aŭtomobila distanco de unu horo kaj duono (130 kilometroj), apud la usona landlimo, troviĝas la fama kaskadego de Niagaro, kiun ni nepre vizitos, ĉu dum la kongresa ĉu dum la postkongresa semajno.

Krom ĉio menciita vi havos la okazon vidi.... Sed ne, ni ne menciuj ĉion; ni lasu iom da mistero, ankaŭ tio estas alloga.

Por aliĝiloj, pli da informoj, ktp, skribu al Esperanto,

Al Toronto (daŭrigo)

P. O. Box 246, Station "F", Toronto, Ontario, Canada.

Ĝis la 31-a de marto 1973, la kongreskotizoj estos: por SAT-ano, \$10; SAT-geedzoj, \$16; juna SAT-ano, \$7; gasto (ne-SAT-ano), \$16; juna gasto, \$10; subtenanto, \$5. Post tiu dato ĉiuj personoj krom subtenantoj devos pagi tri dolarojn pli. "Juna" signifas ĉi tie "de 12- ĝis 21-jaraĝa". Atentu: temas pri kanadaj dolaroj.

La Tri Remboatistoj

--Ken Meyer

En stranga malproksima lando estas du klanoj, la serpento-klano kaj la kojoto-klano. La kojotanoj estas honestuloj kaj ĉiam veras. Sed la serpentanoj estas friponoj kiuj neniam veras. Ilia ĉiu vorto estas mensoga.

Starante apud lagobordo, vi vidas remboateton en kiu estas tri homoj. Ĉar vesperas, la lumo ne sufiĉas por vidi, kiuj estas en la boateto. Sed vi certas, ke estas tri homoj.

"Kiuj vi estas?" vi laŭte krias.

La unua homo respondas, kaj vi aŭdas, ke li respondas, sed vi ne komprenas la vortojn.

"Kion vi diras?" vi demandas.

La dua homo respondas, "Li diras, ke li estas kojotano, kaj li estas kojotano, kaj mi ankaŭ."

La tria homo diras, "Li mensogas. Ili estas serpentanoj, sed mi estas kojotano."

Cu vi povas solvi la problemon? (Solvon vidu ĉe p. 7.)

ELNA-Bulteno

731 Birmingham Road

Burbank, CA 91504

U. S. A. -- Usono

BULK RATE
U.S. POSTAGE
PAID
CRENDALE, CALIF.
PERMIT #575